[noto] fonto: "La Lumo Orienta", Jaro 1:N-ro 1, 1931

# *Venĝo de Korvo*

Fabelo el *saṃyukta-ratna-piṭaka-sūtra*
[laŭ ĉina traduko]
**雑宝蔵経巻十の第百二十**

trad. **Ŝoose Minami**, Japanio

Antaŭ longa tempo vivis korvoj kaj strigoj. Ili malamis unu la alian. Ĉar la korvoj bone sciis, ke la strigoj ne povas vidi en la tago, ili atendis tagiĝon kaj atakis strigojn. La strigoj sciis, ke la korvoj ne povas vidi en la nokto, kaj ili atakis la korvojn nokte.

La strigoj timis tagon kaj la korvoj nokton, kaj ili ĉiam vivis en maltrankvilo. Jen estis tre saĝa korvo inter multaj korvoj.

La korvo diris al la aliaj:

"Se ni batalados ĉiam, ni ĉiuj devus perei. Ni elpensu lertan artifikon kaj mortigi ĉiujn strigojn. Kaj poste ni povos ĝui trankvile."

La aliaj diris responde:

"Kiamaniere do ni povas pereigi abomenajn strigojn?"

La saĝa korvo respondis:

"Vi ĉiuj bekbatu min kaj eltiru miajn plumojn. Ankaŭ piku mian kapon. Mi jen havas bonan ideon kaj nepre pereigos la strigojn."

Kaj ĉiuj sekvis la vortojn de la korvo.

La korvo prenis sur sin mizeran formon kaj vekriis antaŭ la kaverno de la strigoj. Aŭdinte malĝojan krion de l' korvo, unu strigo elvenis kaj demandis la korvon.

"Kial vi havas vundojn sur la kapo? Kial viaj plumoj defalis kaj vi vekrias malĝoje antaŭ mi? Kion v volas?"

La korvo diris al la strigo:

"Miaj kamaradoj malamas min kaj turmentas min, pro kio mi ne povas vivi trankvile. Tial mi deziras eviti ilian atakon ĉe vi."

La strigo kompatis la korvon kaj volis vivteni al ĝi. La aliaj strigoj diris unuvoĉe:

"Ĝi estas nia malamiko! Ne proksimigu ĝin al ni! Kial vi volas helpi al la malamiko?"

Tiam la srigo respondis:

"Por sufero kaj turmento la korvo sola venis al mi. Kion ĝi povus fari?"

Kaj fine ili permesis la korvon vivi ĉe si kaj donis al ĝi manĝaĵojn.

Multaj tagoj forpasis kaj al la korvo denove kreskis plumoj. La korvo ŝajnigis sin

ĝoja antaŭ la strigoj. La korvo metis velkintajn branĉojn kaj herbojn en la kavernon de la strigoj kaj kondutis kvazaŭ ĝi repagus por la bono farita de la strigo.

La strigo demandis al la korvo:

"Kial vi faras tion?"

La korvo diris:

"Ĉar la kaverno estas malvarma roko, mi metas la branĉojn kaj herbojn por defendi nin kontraŭ malvarmega vento."

La strigo kapjesis kaj diris nenion plu.

La korvo gardis ĉe la enirejo de la kaverno kaj trompe repagis por la bono.

Iun tagon neĝo kaj malvarmega vento furioze ekblovis. Ĉiuj strigoj amasiĝis en la kaverno. La korvo ĝojegis kaj forbruligis la kavernon. Ĉiuj strigoj amasiĝis en la kavernon. Ĉiuj strigoj pereis sampempe.